



TEA-BULTENO

10^A JARO

NOVEMBRO - DECEMBRO 2007

NUMEROJ 11-12

Nur uzado igas la vortojn bonaj, veraj, legitimaj vortoj de lingvo.

Alessandro Manzoni

Al la legantaro

En viaj manoj, jam la lasta bulteno de la jaro 2007^a.

Tio pensigas min, tio igas min iom rezonadi pri la pasintaj dek monatoj, se ne por eltiri iajn konkludojn, ĉar ne entute finprezentita la jara programaro, almenaŭ por iel prikonsideri kaj taksi la laboron ĝis nun faritan ene de nia asocio kaj ĉefe tiun direktan al ekstero.

Ekzemple, plej laste, kio okazis? Organize de tri triestaj asocioj - Muzika Junularo (*Amici Gioventù Musicale*), Centro UNESKO kaj TEA kaj kunlabore kun Universitato de Triesto kaj *Bonaventura* (Teatro *Miela*) - dum la 25^a, 26^a kaj 27^a de oktobro, en Teatro *Miela*, kunvenis spertuloj kaj muzikensembloj por kune kontribui al realigo de tre interesa ĉeftemo: KULTURO POR SOCIO SEN BAROJ. Ĉi tiuj asocioj interkonsentis kunlabori kun la celo antaŭenpuŝi la kulturon kiel instrumenton por superi ĉiajn formojn de materiaj, sociaj kaj spirita malriĉecoj, klopodante konsciigi pri la rajtoj je edukado en ĉiuj ĝiaj formoj, por stimuli al kunlaboro kaj interŝanĝo, strebante al iu komuna sento pri kulturo de paco kaj solidareco.

La ĉefrolanto estis la MUZIKO, tiu senlima kaj tutmonda lingvaĵo, kiu kunigas la animojn de ĉiuj homoj, sentemaj al ties forto kaj povo. Kaj en tiun kuntekston perfekte eniĝis Esperanto, kies celo same estas kunigi la homojn per unu sola instrumento.

Konkreta kontribuo de TEA al la tuta manifestacio estis la perado de la kontaktoj kun la muzikgrupo EZERKI & 7/8 el Zagrebo, kies kelkaj membroj, kaj ĉefe reprezentanto, estas esperantistoj. Sabaton posttagmeze Judita Rey Hudeček, profesorino pri germana lingvo, prelegis esperantlingve pri la temo: "La virina figuro en la tradicia makedona muziko", kun lerta samtempa interpretado de nia prezidantino Edvige. En la vespero, la Grupo EZERKI, virinvoĉa koruso, akompane de Orkestro 7/8, entuziasmigis dum pli ol unu horo kaj duono la ĉeestantan publikon. La juna direktoro, Bruno Urlic, sukcesis transmeti al ĉiuj, per sia verva aranĝado kaj ritma prilaborado, la karakterizojn ekstreme variajn kaj apartajn de sonoj kaj kantoj, kiuj atestas kulturon tre foran, miksaĵon de slava, turka, greka kaj bizanca tradicioj.

Ne facilas surpaperigi la emociojn, la sentojn pri pliriĉigado de propra spirito, la mesaĝojn ricevatajn sekve de simpla partopreno en tiu tritaga okazaĵo. Nura espero estas, ke denove, iam en estonteco, prezentiĝu simila okazo, por ke ankaŭ VI, kiu ne havis eblon kunesti, povu iam kunĝui tian programon.

Via Elda

En nia poŝtkesto: ni ricevis...



Sendinto:
T E A



Al ĉiuj karaj
Esperantistoj en Triesto
Via del Coroneo, 15

Miaj tre karaj geamikoj,

Finfine mi trovis iom da tempo por skribi al vi! Kiel vi fartas? Mi fartas sufiĉe bone, malgraŭ kelka sanproblemo pro la aĝo, kompreneble, respektinda aĝo - fakte mi havas jam pli ol 100 jarojn... Ĉu vi memoras pri la pasintjara granda festado? Ho, kiel belis tiam esti je l' centro de ĉies atento! Vere mi ĝuis tiun tutjaran celebradon!

Ĉu vi rimarkis, kiel rapide forflugas la tempo? Baldaŭ mi (kaj ankaŭ vi!) devos ekpensi pri Kristnasko, pri bufedo, vespermanĝo solena, por la geamikoj, por parencoj! Kaj kion diri pri la donacoj? Ho, diable, (*hm, pardonu min, ne decas por maljuna persono tiele paroli...*) kia koŝmaro! Kaj fine, mi eĉ ne havos tempon por aĉetumado! Kion fari? Mi devas bone aranĝi la Internacian Konkurson pri Kristnasko, pri la Kurtfilmoj, en programo jam koncerto de la virvoĉa Koruso MAX REGER... amaso da fendaĵoj! Kaj kion diri pri la problemo trovi ekspoziciejon por elmontrado de Kripoj?!? Kaj ni ne forgesu la libron pri mia 100-jariĝo! Estas limdatoj kiujn mi devas respekti. Kaj tiu libro estas vere grava: imagu, eĉ mian nomon "TEA" certe mi legos sur ĉiuj ĵurnaloj okaze de ties eldono (*nu, bone, ne ĉiuj, eble sur la tagĵurnalo "Il Piccolo", se ĝi estos tiel komplezema miarilate!*).

Konklude, miaj karaj geamikoj, mi esperas je via bonkora komprenemo: mi tute ne havos tempon por iri tien kaj tien, por aĉeti donacojn por vi ĉiuj (*kaj eĉ mi ne scius kion aĉeti: ja, hodiaŭ, ĉiu havas ĉion!*), sekve ekvenis en mian kapon brila ideo (*malgraŭ la aĝo, mia cerbo ankoraŭ bone funkcias, ĉu ne?*): mi pensis pendigi, inter la multaj belaj oraj bantoj de nia Kristnaska arbo, koverton enhavantan etan kontribuadon por Triesta E-Asocio: certe ĝi scios, kiel plej bone ĝin utiligi! Kaj fine, dum tiuj festaj tagoj, kio plej gravas estas la kunestado, tiu sincera interŝanĝado de bondeziroj en vigla kaj gaja etoso! Ĉu mi pravas? Mi esperas ke jes, kaj do, atende de via baldaŭa vizito, plej korajn salutojn kaj kisojn sendas

via T E A

PS - Sugesto: bonvolu uzi multajn kovertojn por pliriĉigi mian kaj vian Kristnaskan arbon!

Triesto kaŝita

"PANDURO"

Sur multaj pordegoj de triestaj domoj, ankoraŭ hodiaŭ admireblas interesaj ŝlosilŝtonoj. Plej ofte estas reprezentitaj la vizaĝoj severaj kaj agresemaj de lipharuloj, surhavantaj strangan kalpakon kiel kapveston, kun aspekto tamen tipe militista. Tiu ŝtona kapo estas nomata "Panduro".

Sed kio, aŭ pli bone kiuj, estis envere tiuj *Panduroj*? Temis pri armitaj kamparanoj el teritorioj hungara, slava, rumena, je la servo de la nobeloj Bojaroj (Bojaro estis riĉa terposedanto). Je la fino de la 17^a jc, Panduroj organiziĝis en specialaj infanteriaj trupoj je la ordonoj de la Habsburga armeo kaj havis la taskon defendi la imperiajn landlimojn. Ilia ĉeftrajto, krom nevenkebla kuraĝo, estis senbrida krueleco kontraŭ ĉio kaj ĉiuj. Dum longa periodo, sub regado de imperiestrino Maria Theresia, estis ilia komandanto barono Karl Franz von Trenk, famkonata pro lia MEMORLIBRO. La panduroj,



konsistantaj specialan brigadon submetitan je tre rigida disciplino, ĝuis ene de la armeo gravan aŭtonomecon. Iliaj vestoj kaj aranĝado estis tre karakterizaj: surkape ia speco de dik-ŝtofa kalpako, la hararo kunmetita en pluraj plektaĵoj, kaj, sur tre eleganta uniformo, oni surmetis larĝan, ruĝan mantelon. Ilia persona armil-ekipaĵo konsistis el fusilego fajroŝtona, kompletita per krucforma bajoneto, kvar pistoloj, same fajroŝtonaj, ĉe la zonego, russtila sabro kun larĝa klingo, ĉas-tranĉilo, pli ol 70 centimetrojn longa, plus du pli malgrandaj tranĉiloj enigitaj en la botojn.

Panduroj havis siajn glorajn momentojn pro siaj heroaĵoj kontraŭ Turkoj kaj Prusoj: ilia konduto tiel impresis la popolan fantazion, ke ekde tiam oni ekornamis la dompordegojn per ilia kapo. Plej ofte, kiam atingita la pensiĝa aĝon, tiuj militistoj venis al Triesto, kie eblis facile ricevi laborpostenon kiel dompordistoj, gardistoj aŭ korpogardistoj ĉe familioj de novriĉuloj. Havi je propra servo iun Panduron, signifis supreniri unu plian ŝtupon de la urba elit-eskalo.

Nova Jubilea simbolo de UEA

En la konkurso starigita de UEA, pri simbolo okaze de ties 100-jariĝo en 2008, partoprenis 19 aŭtoroj aŭ aŭtoraj duopoj el 12 landoj. El la alvenintaj proponoj, kiuj devis emfazi, laŭ la postuloj de regularo, per taŭga kaj trafa bildo la 100-jaran historion de nia Asocio kaj ties aktualecon en celoj kaj idealoj, per priskribo kiel eble plej elvoka, simpla kaj uzebla en presa kaj elektronika formoj, la du UEA-Estraroj prijuĝis kaj selektis, lasante la finan decidon al la nova estraro elektita en Jokohamo. Unuanime oni elektis la grafikan prezentaĵon de **Guillem Sevilla** la plej taŭga. La aŭtoro estas 24-jara grafika dezajnistino el Barcelono, membro de KATALUNA ESPERANTO-JUNULARO.

Jen la klarigo de Guillem pri la bildo: la simbolo emfazas "per simpla kaj aktuala aspekto la tut-teran disvastigon de la neŭtrala lingvo Esperanto, atingitan grandparte danke al UEA". "Ĝi subtile rilatiĝas al tradiciaj esperantismaj identigiloj (stelo), sed ĝi uzas ankaŭ eksterajn identigilojn (parolveziko, kvin koloroj) rekoneblajn de la publiko, kiu ne konas la esperantistan heraldikon". La elektita emblemo ne havas unu fiksan formon, sed "temas pri fleksebla identiga sistemo kun senfinaj potencialaj variantoj depende de la bezonoj kaj rimedoj".



Plia Doktorigo pri Esperanto



Doktoriĝis en la Universitato de Amsterdamo la iama estrarano de ESPERANTO NEDERLAND kaj de INTERNACIA ESPERANTO-INSTITUTO, **Wim Jansen**, docento pri interlingvistiko kaj Esperanto en tiu sama universitato. Por atingi tiun ĉi rezulton li faris esploron pri vortordaj aspektoj tro-

eblaj en la nuntempa, ĵurnalismeca lingvaĵo kaj publikigis pri tio disertacion, kiun li sukcese defendis la 2^{an} de oktobro. La dokorigaj akompanantoj estis la profesoroj Hengeveld (por la ĝenerallingvistika parto) kaj Van Oostendorp (por la ĝenerallingvistika kaj esperantologia aspektoj). En la dokoriga komisiono sidis i.a. prof. Haase de la Universitato de Bamberg, Germanio. La ceremonion ĉeestis pluraj konataj esperantistoj el Nederlando kaj aliaj landoj.

La 283-paĝa disertacio estas verkita en la nederlanda lingvo kaj proponas resumojn en la angla, Esperanta kaj germana lingvoj. Temas pri la dua disertacio pri Esperanto, rilatanta temon defenditan en nederlanda universitato ene de unu jaro (post Marcus Sikosek, doktoriĝinta en novembro 2006 post esploro pri la historio de UEA), sed pri la unua disertacio post 1947, kiu rekte concernas la lingvon mem. Estas antaŭvideble, ke la Universitato de Amsterdamo baldaŭ nomumos Jansen plenrajta speciala profesoro en la katedro, kiun li de 2004 okupas en la nomo de Internacia E-Instituto. La teksto de la disertacio estas libroforme aĉetebla ĉe IEI kontraŭ 25,20 €.

Informis Atilio Orellana Rojas iei001@tiscali.nl



Estas ankoraŭ tempo por partopreni en la Internaciaj Konkursoj, organizataj de Triesta Esperanto-Asocio:

1) KRISTNASKO: MIA BILDO PRI ĜI

kies limdato estis prokrastita ĝis la fino de novembro 2007!

Do, rapidu, ĉar vi riskas perdi interesan okazon! Petu detalojn, regularon kaj aliĝilojn, poŝte aŭ rete, al **ESPERANTO TRIESTE – CP 601 Trieste Centro IT-34101 Trieste**

aŭ noredv@tele2.it; testudo.ts@gmail.com

2) KURTA KINOESPERANTO FESTIVALO

limdato ĝis, plej malfrue, la 15^a de decembro 2007



RUSOJ LOĜAS EN RUSUJO

Verkisto: LÖWENSTEIN, Anna (red)

Subtitolo: Landonomoj en Esperanto

Eldonejo: FEI, 2007

"La longa historio de Esperanto montras, ke estas ekstreme facile malfaciligi Esperanton kaj ege malfacile plibonigi ĝin. ", (Renato Corsetti skribis en la Antaŭparolo de la libro).

La maldika kolekto de artikoloj, pledantaj por la uzo de la landonom-indika sufikso **UJ** estas redaktita de Anna Löwenstein, anglino loĝanta en Ital**UJo**. Ŝi sukcesis instigi dudekon da esperantistoj, konatajn kaj praktikajn uzantojn de la lingvo, esprimi siajn (pozitivajn) starpunktojn rilate al la uzo de **UJo**, sekve kontraŭe al la uzo de la pli kaj pli disvastiĝanta **IO**.

Responde al la invito la aŭtoroj sendis diversstilajn kontribuojn: eseojn, studojn, poemojn kaj konfesojn, argumentadojn kaj konsilojn, sonĝojn kaj imagitajn dialogojn, amplekse variajn de 3 linioj ĝis 15 paĝoj. La legantoj de la libreto povas ekkoni objektivajn lingvistikajn kaj emociplene personajn argumentojn pri la temo. Bertilo kompilis liston pri la **UJo**-landnomoj kaj ties loĝantoj, Anna dividas siajn instruistajn spertojn.

Ĉar Zamenhof kreis la landonomsystemon ne perfekta, ne unueca, la konsekvencoj estas konfuziĝo, diskutoj kaj disputoj. Fine de la libreto de Anna Löwenstein troviĝas la **PROMESO** (laŭ la Zamenhofa modelo):

Mi, subskribita, promesas ekuzi la finaĵojn -ujo en landnomoj, se estos montrita, ke kvin mil personoj donis publike tian saman promeson.

Vian promeson vi povas loki ĉe www.bonalingvo.it/promesoj Se vi estas malferma por konvinkiĝi pri „**UJo**-ismo” legu la libreton. Sed se vi preferas uzi kaj instrui la **IO**-formajn landnomojn, ankaŭ tiukaze povus esti interese ekscii pri la argumentoj de la alia partio.

El www.edukado.net

Manumado de ovo!

- Bonvole, kafon!
- Kun lakto, sen lakto, varma ĉu malvarma?
- Nu, dankon, kafon tute nigran kiel karbo kaj varman kiel mia koro!

Rapida, kelkvort-interŝanĝo inter klientino kaj kafeja kelnero. Same rapide, jen antaŭ mi bonodora, fumanta, vekopova matena trinkaĵo!

Volonte, preskaŭ ĉiutage, mi vizitas ĉi kafejon, ankaŭ pro ties ĉarma kutimo, ĉiam meti en la subtasa telereto bombonon, aŭ kafograjnon tegitan per tavolo da ĉokolado, aŭ kuketon... Ĉi foje novaĵo: envolvita en plasta, travidebla papero, brunkolora biskvito, produktita en Belgio! Delikata cinam-parfumo tiklas miajn flarsensilojn: mmmh, kia frandaĵo!

Scivoleme, dum gustumado, eklego de la instrukcioj, nu, pardonu, eklego de la tre detalaj informoj, sur 9x5-centimetra pakajeto, pri tiu specialaĵo: “**KARAMELITA BISKVITO**” (*estas la klarigo!*). Inter la ingrediencoj: siropo kandita, faruno el tritiko kaj el sojo, acida karbonato de natrio, vegetalaj oleo kaj graso, salo, cinamo. Krome, dik-litere, oni atentigas ke en ĝi estas: tritiko kaj sojo (*denove!*). Do, pli bone dufoje, ol nenio, ĉu ne? Eble tio estas kroma atentigo por tiuj malsanuloj, kiuj ne toleras glutenon. Kiel ili nomiĝas? Ĉu..., ĉu...? Vastega nigra truo en mia kapo: ne sukcesas eliri el ĝi la taŭga vorto, sed vi komprenis pri tio temas, ĉu ne?



Do, la unua problemo solviĝis, sed kio pri tiu ĉi alia? La posta detalo: “Produktita en fabriko, kiu *manumas*: ovon” daŭre perpleksigas min. Mi legas kaj relegas, elpremante miajn jam elĉerpitajn cerboneŭronojn, kun espero je iu sensacia eksolvo de la enigmo, sed vane. Kio povus esti tia *manumado*? Subite lumo ekflagris en mia cerbo! Certe: ili ĵonglas per la ovoj, antaŭ ol ilin rompi kaj disigi ovoblankon el la ovoflavo! Kial ne tuj pripensi tion? Nun, sentante min tute senpezigita, lante mi daŭrigas gustumi tiun envere bonegan kukon ... Esti kelkfoje fatalisma faciligas la vivon. Ĉu ne?



Kvara ĥrimromano pri komisaro Maigret

Antaŭ kelkaj tagoj, eldonejo **SEZONOJ** aperigis la libron **LA FLAVA HUNDO** de Georges Simenon. Ĝi estas la kvara libro pri komisaro

Maigret en Esperanto post **MAIGRET HEZITAS** (1999), **MAIGRET KAJ LA MALJUNA DAMO** (2002) kaj **AMIKO EL LA JUNAĜO DE MAIGRET** (2004). Ĉiuj estas tradukitaj de Daniel Luez (Francio).


LA FLAVA HUNDO estas unu el la plej fruaj romanoj pri la mondkonata komisaro. Ĝi estis eldonita en 1931, kaj jam sekvajare ĝia filmoversio, kun Abel Tarride en la rolo de Maigret, estis spektebla sur ekranoj de kinejoj. Kelkaj realaĵoj, menciitaj en la romano, eble ne estas facile kompreneblaj por nuntempuloj, precipe por nefrancoj, tial iuj estas klarigitaj en *Notoj*. Estas aldonita ankaŭ proksimuma prononco de kelkaj francaj nomoj, troveblaj en la romano. La libro estas presita en Kaunas, Litovio. La kovrilon faris Larisa Jakovleva.

La libro estas mendebila kontraŭ 12 eŭroj ĉe pluraj libroservoj, al kiuj la eldonejo jam sendis la librojn. En la retejo <http://www.esperanto.org/Ondo/> en la rubriko *Franca literaturo en Esperanto* estas legeblaj la Antaŭparolo (de Aleksander Korĵenkov) kaj la unua ĉapitro.

inf: *Aleksander Korĵenkov* <sezonoj@kanet.ru>

www.amikumu.com

Ĉu vi ŝatus trovi interesajn esperantistojn apud vi?... aŭ vidi la mondon per aliaj okuloj? Nun vi povas fari tion per la unua interkona retejo en Esperanto, **Amikumu!** Fote kaj skribe esprimu vin kaj influu la mondon, la sola limo estas via imagoj... Ni nun havas **1624** membrojn en **94** landoj kaj **3628** fotojn. Venu kaj **amikumu** kun ni!



Mallonge pri ... Italio!

Libroj en Italio. Ĉe la adreso <http://www.esperanto.it/html/fei/publicazioni.htm> troveblas listo de ĉiuj disponeblaj libroj ĉe Itala Esperanto-Federacio. Tre simplas la serĉado de

la dezirataĵo, ĉar la verkoj estas dividitaj laŭ temoj, kaj kostoj kaj aĉet-maniero estas tre klare indikitaj. Por poste mendi, sufiĉas mesaĝi al: <libroservo@esperanto.it>

Premio Zamenhof – en Ancona La 7^{an} de decembro, je la 21^a horo, ĉe *Teatro Sperimentale*, okazos transdono de la premio **Zamenhof**, fare de Itala Federacio, al personoj kontribuintaj antaŭenpuŝi tiuj idealojn proprajn de la esperantomovado. Ĝin sekvos lirikkoncerto. La ĉijaraj premiitoj estas: Gianfranco D'anna, vicdirektoro de GR1, por dokumenta filmserio "Forgesita Planedo"; Manuela Dviri, loĝanta en Israelo, ĵurnalistino kaj iniciatinto de la kunlabora agado inter israela kaj palestina kuracistaro ĉe la Jerusalema Malsanulejo; Stefania Casini, eksa kino-aktorino, nuntempe televida reĝisoro, por kelkaj dokumentaj filmoj el tre grava socia kaj interkultura engaĝiĝo, inter kiuj "Latinameriko" kaj "Surstrataj pastroj". La Premion **Stoppoloni** ricevos la Asocio "Revekiĝo", engaĝita en socia kampo pri integriĝado de eksterkomunumanoj.

Nova Fei-Estraro Dum la itala kongreso, okazinta septembre en Pisa, estis elektita la nova estraro, kies konsisto jenas: **Prezidanto:** Renato Corsetti; **Vicprezidanto:** Aldo Grassini; **Ĝenerala Sekretario:** Laura Brazzabeni; **Kasisto:** Riccardo Pinori. Aliaj membroj estas: Ranieri Clerici, Mario Menghini kaj Nicola Ruggiero.

Al ĉiuj Triesta E-Asocio deziras sukcesan kaj fruktodonan laboron en ilia por- kaj pri-esperanta agado!

Tiel mi kuiras!
Kaj vi?

LA NUGATO

La Kristnaska periodo ree proponas, kiel ĉiujare, tradiciajn renkontiĝojn en familio kaj dum tiuj festotagoj certe la tablojn la milana kuko [panettone] kaj tiu verona [pandoro].


Jam en la romia epoko estis konata la nugato, kiel montras skribaĵoj de *Tito Livio*. La latina poeto *Marziale* nomumis tiun specialaĵon "cupedia" kaj ankaŭ *Plinio* mencias, kiel efika rimedo kontraŭ tusado, tre similan dolĉaĵon "aravicelum", ĉefe el pinsemoj kuiritaj en mielo.

Ŝajne la itala nomo "torrone" (turego) devenas el dolĉaĵo turoforma, speciale preparita en la jaro 1441 por la geedziĝo inter *Bianca Maria Visconti* kaj *Francesco Sforza* en Cremono. Sekve tiu ĉi loko restis la ĉefurbo en Italio pri tiu specialaĵo.

Eĉ hejme eblas prepari nugato-specialaĵon: jen unu el la multaj receptoj pri "Mola Nugato".

INGREDIENCOJ

300 g mielo
300 g sukero
100 g akvo
3 ovoblankoj (neĝe pufigitaj)
600 g amandoj (iomete rostitaj)
vanila esenco



PREPARADO

- 1 – En duoble funda kaserolo por mergovarmigo, kuiru la mielon, maksimume ĝis 80°C, daŭre ĝin miksante.
- 2 – Kiam ĝi iĝos malhel-blonda, aldonu, iom post iom, tre delikate, la pufigitajn ovoblankojn.
- 3 – En alia ujo solvu la sukeron en akvo, ĝin kuirante je varmo de ĉirkaŭ 145-146°C.
- 4 – Antaŭ ties karameliĝo, aldonu kelkajn gutojn de vanila esenco kaj deprenu la ujon de la fajro.
- 5 – Al tiu ĉi komponaĵo aldonu la antaŭe preparitan mielon kaj la amandojn.
- 6 – Miksu kaj verŝu la tuton en rektangulan ujon, antaŭe tegitan per oblato-folioj. Kovru ĝin per alia oblato-folio kaj ĝin premu per glata ilo.
- 7 – Dum kelkaj horoj ĝi devas malmarmiĝi. Kiam ĝi malvarmetas, tranĉu per apenaŭ malsekigita tranĉilo kaj enpaku per stanfolioj aŭ diafana folio por nutraĵoj.

NI KONTRIBUU AL PLUKRESKADO DE ESPERANTO EN WIKIPEDIO!

La Esperanto-versio de Wikipedia (Vikipedio: <http://eo.wikipedia.org/>) transpasis la nombron de 90 000 artikoloj la 19^{an} de oktobro 2007 (fine de oktobro 90 491). Bedaŭrinde, ĝi perdis la 15-an lokon inter pli ol 250 lingvoj pro la pli rapida kresko de la turka: 93 578 samdate, sed la turka estas ja parolata de multe pli da homoj (inter 65 kaj 73 milionoj)... Pro tio, la Esperanto-versio bezonas pliajn kompetentajn kunlaborantojn. Utilas ankaŭ kunlabori pri Esperanto en la nacilingvaj versioj, ekzemple per traduko de partoj el la portalo.


Ĉiuj - inkluzive de ĉiu leganto - povas redakti ĉiun artikolon, korekti lingvajn erarojn, pligrandigi artikolojn, skribeti, aŭ skribegi. La oftaj demandoj klarigas kiel redakti paĝon kaj aliaĵojn. En la paĝo lastaj ŝanĝoj aperas ĉiuj ŝanĝoj. Ĉiu povas kontribui libere, ĉar Vikipedio estas komunuma projekto, ne finita verko, kaj ĝi senĉese ŝanĝiĝas. Se vi ŝatas kunlabori pri iu certa temo, kontrolu nian portalejon, kie estas listitaj ĉiuj temaj portaloj.

Valoras iomete promeni tra ĉi tiuj ejoj kaj, ĉefe!, kunlabori:

<http://eo.wikipedia.org/wiki>
<http://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto>

inf: [Henri Masson espero.hm@wanadoo.fr](mailto:Henri_Masson_espero.hm@wanadoo.fr)

Malferma tago ĉe UEA



La konata historiisto d-ro Ulrich Lins prelegos en la MT ĉe CO de UEA sabaton, la 24^{an} de novembro. D-ro Lins, en kies redakto lastatempe reaperis la klasika verko VIVO DE ZAMENHOF de E. Privat, faros du prelegojn. Unu traktos la staton de esploroj pri Zamenhof, dum la alia rilatos al UEA-historio. Enprograme aliaj prelegoj, libroprezentoj kaj filmoj. La vizitantoj povos profiti de rabatoj en la libroservo kaj gajni esperantaĵojn en senpaga loterio. Kafo kaj teo, ankaŭ senpagaj, estos varmaj la tutan tagon. La Malferma Tago daŭros de la 10^a ĝis la 17^a horo.

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo: Via Coroneo 15 - 34133 Trieste
tel/fakso: +39 040 763128
Reto: esperantotrieste@adriacom.it; noredv@tele2.it
Grupa ttt-ejo: it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatristina
Poŝta adreso: CP 601 Trieste Centro IT-34101 Trieste - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349

Ludoj, ŝercoj, enigmoj...

1 Ĉu fantomo?

Mondkonatas la greka alfabeto!
Do, ĉefrolas malgranda litero
de tiu aro, en fama bildstrio,
kiun vi tutcerte memoras.

E	J	D	M
S	A	E	I
O	T	N	R
R	I	S	T

2 Startu de unu ĉelo kaj trairste la proksimajn ĉelojn (horizontale, vertikale kaj diagonale) trovu nomon de mastrumanto en fabriko aŭ institucio.
Utiligu ĉiujn 16 literojn nur unufoje.

7	2	?	6	0	?	4	?	6	=	10
1	?	9	?	2	?	6	?	5	=	10
4	5	?	1	0	?	2	?	1	=	10

Cerbumu,
cerbumu...



VIGLO

4 Kruelega tirano

Krom propra evidenta perforto per kiu multaj perdis sian kapon, nekontestebles ja, tute malkaŝe, sia superrego por la mortobato.

Solvo de la ludoj aperintaj en la septembra-oktobra TEA-Bulteno:

Koramiko: *La Taglibro*; Matematika Kvizo: $7 + 20 - 3 : 12 \times 4 = 8$; $9 + 12 : 3 \times 7 - 8 = 41$

Kido sanigas

La ruza ĉevalkomercisto

Tio okazis ĉirkaŭ 1920 en la hungarlingva Karpata Rutenio. Sinjoro Kohen, ĉevalkomercisto, alvenis al iu ĉevoja gastejo por tranokti. Li alligis sian ĉevalon en la stalo. Post unu horo li iris kontroli, kiel fartas la ĉevalo, kaj konstatis, ke la ĉevalo agonias. Li tuj rapidas al la gastejo, eniras la drinkejon, kaj laŭte anoncas:

“Mi volas lotumi mian ĉevalon inter vi! Ĉiu, kiu aĉetos lotumbileton por 1,000 florenoj, povas partopreni, kaj eble gajni la ĉevalon!”

Nu, 1,000 florenoj estas apenaŭ kvinono de la valoro de unu ĉevalo. Estas do multaj, kiuj deziras riski. 30 biletoj forvendiĝas, kaj oni tuj surloke aranĝas la lotumadon.

La gajnanto estas sinjoro Balasz. Li levas la bileton kun ĝojo kaj demandas sinjoron Kohen, kie estas la ĉevalo. Kohen tiras lin flanken kaj diras al li: “Vidu, la ĉevalo jam preskaŭ mortis. Sed mi ne volas, ke ĝuste vi perdu monon, do mi tuj redonas al vi viajn 1,000 florenojn, kaj aldonas ankaŭ plian milon, por ke vi estu kontenta.”

“Mi tre dankas al vi pro via sincereco kaj malavareco”, diris ĝoje sinjoro Balasz. “Sed kion diros la aliaj?”

Tiam Kohen respondis senhezite: “Kion ili povus diri? Ĉu ili gajnis?”

Kaj tiam li foriris kun 28,000 florenoj en la poŝo...

Tre riĉa usonano

festis sian 95-jaran datrevenon. Li invitis al sia hejmo siajn 3 plej proksimajn amikojn: katoliko, protestanto kaj judo. Ĉeestis ankaŭ lia advokato. Li anoncis al ili jene: “Mi deziras heredigi al vi po 100 milionoj da dolaroj. Sed mi havas unu kon-diĉon: dum mia enterigo ĉiu el vi devos meti en mian ĉerkon 100 mil dolarojn. Tio estos pruvo, atesto, kiu montras ke vi fidas min.” Post kelkaj monatoj li forpasis. Ĉe la tombo, sub la strikta kontrolo de la advokato, la **katolika** amiko enĉerkigis 100 mil dolarojn kontante. Same faris la **protestanto**. Tiam venis la **judo**, elprenis de la ĉerko la 200 mil dolarojn kaj enĉerkigis anstataŭe ĉekon je la sumo de 300 mil dolaroj.

Judo kun bona memoro

Judo el Jerusalemo sukcesas esti ricevita aŭdienco de la Papo kaj tiam diras al Li: “Via Sankta Moŝto, mi heredis mian restoracion de mia patro, kiu heredis ĝin de sia patro, kiu heredis ĝin de sia patro, kiu heredis ĝin de sia patro, kiu...” La Papo senpacience haltigas lin: “Sufiĉe! Ĉu vi volas atingi la tempon de Jesuo Kristo?” “Ĝuste tion!”, diras la judo. “Temas pri la Lasta Vespermanĝo. Vidu, fakte... ĝi neniam estis pagita...”



Fonto: nova listo de abo(men)antoj de judaj humuraĵoj.



Novembra Programo	
2 - vendredo	20h00 - Verboj, afiksoj, prepozicioj
6 - mardo	20h00 - Teatraj legaĵoj
7 - merkredo	14h40 - Esperanto ĉe alirprogramoj de RAIUNO
9 - vendredo	20h00 - <i>Lecturae Dantis</i> esperante, itale, triestadialekte
10 - sabato	17h00 - inaŭguro de statueto de Friedrich Schiller 17h30 SCHILLERTAG - en Salono Beethoven - 2 ^a et.- Prezento de la granda germana poeto, okaze de ties naskiĝdatreveno: deklamado de poeziaĵoj, ankaŭ en esperanto, kaj kant-koncerto
13 - mardo	20h00 - Teatraj legaĵoj
16 - vendredo	20h00 - Enigmoj en Esperanto
20 - mardo	20h00 - Teatraj legaĵoj
23 - vendredo	20h00 - Marija Belošević parolos pri: <i>Kroata literaturo en esperanto</i>
27 - mardo	20h00 - Teatraj legaĵoj
30 - vendredo	20h00 - Verboj, afiksoj, prepozicioj

Decembra Programo	
4 - mardo	20h00 - Teatraj legaĵoj
7 - vendredo	20h00 - <i>Lecturae Dantis</i> esperante, itale, triestadialekte
10 - lundo	14h40 - Esperanto ĉe alirprogramoj de RAIUNO
11 - mardo	20h00 - Teatraj legaĵoj
12 - merkredo	18h00 - NATALE ASSIEME Koncerto de la Virvoĉa Koruso MAX Reger, direkte de M ^o Bruno De Caro, ĉe la Salono Beethoven, 2a etaĝo
14 - vendredo	20h00 - Memore de la naskiĝdatreveno de nia Lazaro Ludoviko Zamenhof
18 - mardo	18h00 - NATALE ASSIEME Koncerto kun la koruso Ŝkofijska Dekleta el Ŝkofije, kiu prezentos tradicie kristnaskajn kantojn kaj legadon de poeziaĵoj slovane, itale kaj esperante, sub gvidado de Marjeta Povoska
21 - vendredo	20h00 - Bondezirinterŝanĝo! Bonan Kristnaskon al nia TEA!
25 - mardo	Bonan Kristnaskon!
28 - vendredo	19h30 - Kune ni adiaŭu la Jaron 2007 ^{an} !

Mi devas rememori ke...

- 1) Kurso unua-grada okazas ĉiun vendredon je la 18^a horo.
- 2) Kurso dua-grada okazas ĉiun mardon je la 19^a horo.
- 3) Prezento kaj lecionoj de Esperanto ĉe Universitato de 3-aĝuloj: dum la vendredoj 9^a, 16^a, 23^a, 30^a en novembro kaj 7^a en decembro, de 17h30 ĝis 18h20.
- 4) Daŭre ekzerciĝas la Koruso "Verdaj Anĝeloj", ĉiumerkrede ekde la 18^a horo, sub gvidado de Devana Pizziga. Kiuj deziras aliĝi al la grupo, bonvenas kiam ajn.
- 5) ...TEA bondeziras al ĉiuj siaj legantoj kaj asocioj plej feliĉan Kristnaskon kaj Pacan 2008^{an} Jaron!**

